ANTAŬEN suplemento de Informilo 1/33 marto 2025

❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖
**Enhavo: Ni pli maljunaj, El la vivo, La grupo E-mental**
❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖

Dum renkontiĝo de miaj eksaj kunlernantoj okdekjarulo el bazlernejo en Valašské Klobouky, kiu okazis samloke en junio 2024, unu nia kunlernantino disdonis al ni tekston, kies tradukon mi nun volas prezenti al vi:

## NI PLI MALJUNAJ…

(La teksto estas reskribita el interreto, la aŭtoro nekonata…)
Multaj el ili jam forpasis kaj tiujn, kiuj estas daŭre ĉi tie, ni nomas „la pli aĝaj"…

Ili naskiĝis en la 1940 -50-60aj jaroj.

Ili kreskis en la 50-60-80aj jaroj.

Ili studis en la 60-70-80aj jaroj.

Ili travivis kune la 70-80-90ajn jarojn.

Ili geedziĝis kaj esploris mondon en la 70-80-90aj jaroj.

Ili spertis aventurojn de la 80-90aj jaroj.

Ili transsaltis en la jaron 2000.

En la jaro 2010 ili jam estis „la pli saĝaj" kaj en la jaroj 2020aj ili iris plu…

Ili trairis OK diversajn jardekojn – DU diversajn jarcentojn…
DU diversajn jarmilojn…

Ili transiris de telefono kun operatoro por longdistancaj paroloj kaj de pagitaj telefonbudoj al videoparoloj tra la tuta mondo.
Ili spertis ŝanĝon de vaporaj lokomotivoj por elektraj kun unudirektkurenta, miksa kaj fine alternkurenta trakcioj.
Ili trairis de nigroblankaj bildoj al You Tube, de viniloj al online-muziko, de permane skribitaj leteroj al e-mesaĝoj kaj Whats App, de vivaj ludoj en radio kaj nigroblanka televido al la kolora kaj poste al HD 3D. Ili iradis en videopruntejojn kaj nun ili rigardas Netflix.
Ili travivis etapojn de elektronlampoj, transistoroj kaj de integritaj cirkvitoj.
Ili ekkonis trukartojn, trubendojn, la unuajn komputilojn, magnetofonajn bendojn, magnetbendojn kaj magnetdiskojn, eĉ kun duonmetraj diametroj, kaj nun ili havas gigabajtojn kaj megabajtojn en saĝaj telefonoj.
Dum la tuta infaneco ili portis pantalonetojn, foje pantalonojn sonorilformajn kaj minijupojn, ŝuojn sur nadloj, ankaŭ sur platformo, kombineojn kaj bluajn ĝinsojn.
Ili evitis infanparalizon, meningiton, paralizon, tuberkulozon, porkan gripon.
Ili havis la unuajn rulsketilojn kun 4 radetoj, triciklon, biciklon, mopedon, aŭtomobilon funkciigatan per benzino aŭ nafto, kaj nun ili veturas per hibridoj aŭ elektraj aŭtomobiloj.
Ili ludis globetojn, homo ne koleru, ŝakludon, damludon, pluvas-ludon kaj monopolojn. Nun estas ĉi tie candy crush sur iliaj saĝtelefonoj.
Ili multe legis. Dancis je dancamuzoj kaj diskotekoj.
Ili ekskursadis, veturadis je lupolaj-brigadoj, je terpomaj-brigadoj kaj ekstere ili rostis kolbasojn sur bastoneto.
Religio de kunlernantoj ne estis objekto de iliaj kvereloj kaj diskutoj.

Ili trinkis akvon el puto aŭ el krano, limonadon el vitraj boteloj. Fruktojn kaj legomojn ili havis sur la telero ĉiam freŝajn.
Jes, multon ili spertis, sed kiel belan vivon ili havis! Hodiaŭ ni povus nomi ilin „estintaj naskiĝjaroj“ – ili estas tiuj, kiuj naskiĝis en la 40-50-60aj jaroj kaj ili havis analogan infanecon kaj ciferecan maturecon. Ili spertis la unuan flugon en la kosmon kaj la unuajn paŝojn de homo sur la Luno. Ili spertis ankaŭ biologian revolucion – malkovrojn de la molekulo de la vivo DNA, RNA kaj pluajn. Kiam ni vidas, kio el tio naskiĝis – gena terapio, genaj premkopioj de fingroj kaj aliaj – do, la progreso estas miriganta!

ILI IELE TIELE VIDIS ĈION!

Ĉi tiu generacio estis laŭvorte atestanto de neproporcie pli da eventoj ol kia ajn alia. Ĝi estas la generacio, kiu sukcesis adaptiĝi al ĉiuj ŝanĝoj. ***Grandan gratulon por ĉi tiu speciala generacio, kiu porĉiame restos unika.*** Tio estas niaj gepatroj, pragepatroj kaj eble ankaŭ ni…

Tradukis kaj iomete kompletigis Josef Vojáček



## El la vivo – citaĵoj

La paro ekkonos unu la alian dum eksgeedziĝo. Gefratoj en heredo. Infanoj en aljunaĝo kaj amikoj en malfacilaĵoj.

desegnis: Zuzanka Pospíšilová

Nuntempe, ni ne devas klarigi ion pri ni

mem. La aliaj faros tion  tuj, kiam ni forlasos la ĉambron.

Vi neniam estos sufiĉe bona por ĉiuj, sed vi ĉiam estos la plej bona por iu, kiu vere estimas vin.

Stultuloj ne bezonas esti serĉataj... Ili ĉiam parolas memstare!!!

Larmoj ne signifas, ke homo estas malforta. Larmoj signifas, ke la koro sentas pli ol ĝi povas elteni.

Kiu kraĉas malpuraĵon sur aliajn, tiu kutime nur kovras sian propran malordon.

El la interreto tradukis L.S.



**La Grupo E-mental'** travojaĝis en oktobro 2024 la regionon Kalabrio en la suda Italio. Inter aliaj vidindaĵoj, ni vizitis la preĝejon de la Cattolica en la urbeto **Stilo**. Ĝi estis konstruita en la 9-a jarcento el brikoj kaj ŝtono kaj estas unu el la plej gravaj ekzemploj de bizanca arkitekturo en Italio. La interno estas kovrita per belegaj freskoj.

S. Nováková